Centro Internacia de Esplorado pri Anarkiismo

Centro Internacia de Esplorado pri Anarkiismo (france *Centre International de Recherches sur l'Anarchisme* CIRA) estis fondita en la jaro 1957 en Ĝenevo, Svislando. Ekde la jaro 1989 ĝi situas en Laŭzano, (france Lausanne), Svislando, en parto de vilao, kie volontuloj mem konstruis la taŭgajn ejojn por arkivejo. Tiu biblioteko kolektas, konservas kaj metas je dispono librojn, periodaĵojn kaj dokumentojn, kiuj iel rilatas al la historio, movado kaj ideoj de anarkiismo.

La kolektoj

10 000 libroj en plej diversaj lingvoj, ĉefe en la franca, itala, hispana, germana, angla, kaj Esperanto, ekde 1848 ĝis nun.

4000 periodaĵoj, inter aliaj proks. cent vivantaj kolektoj.

Pluraj centoj da registraĵoj ĉu aŭddokumentoj ĉu viddokumentoj.

Pluraj dekoj da kolektoj de dokumentoj ĉu de preciza persono ĉu de preciza organizo.

Diversaj kolektoj: poŝtkartoj, fotoj, afiŝoj.

Ciferigado survojas. Jam pli ol 30 000 notoj ekzistas. www.cira.ch/catalogue (http://www.cira.ch/catalogue)

Internacia kunlaboro

Ekzistas similaj centroj, arkivejoj en Eŭropo kaj kunlaboro ekzistas kadre de internacia federacio www.ficedl.info (http://www.ficedl.info). Komuna katalogo atingeblas per www.rebal.info (http://www.rebal.info)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Centro_Internacia_de_Esplorado_pri_Anarkiismo&oldid=6846073"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 21:35, 17 jan. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.